# HEJSUNECO

**HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO**

Sol, 75  41003 Sevilla

N-ro 127  Septembro, 1.986




Jubilea Jaro

1887 - 1987

Eldonas, H.E.J.S., Sol 75 41003 Sevilla

Redakcio, Atocha, 98 28012 Madrid

Direktoro, Miguel Angel Sancho Pardo

Redaktoroj, Ricardo Felipe Albert Reyna
Georgo Kamaĉo

Kunlaboras, Prezidanto de HEJS: Alberto Franco
Ricardo Garcia Tarín
Antonio Valén
Natividad Millán
[redacted]
Pablo J. Romero Gómez

Presita per ofseto en Madrido, 1.986

## INDEKSO

Paĝo

2 ............................ Indekso
3 ............................ Ĉefartikolo
Venonta renkontiĝo de HEJS
4 ............................ Leteroj al la Direktoro
(Pri "Ĉis Kiam")
5 ............................ La paĝo de Superhejs
(Ŝanĝo de la estraro)
6 ............................ *Kial tiu obsedo?*
7 ............................ Novaĵoj
8 ............................ Ĉu taŭroludo au taŭrotorturo?
10 ............................ Poezia angulo
11 ............................ Pri la fiŝa tranlikiĝado
14 ............................ Panspermio
15 ............................ Renkontiĝo de HEJS en la
47a Hispana kongreso de E.
(aliĝilo)

Pri la enhavo de siaj artikoloj reponsas ĉiu autoro. La redaktoroj pretas lingve korekti la prozajn kunlaboraĵojn, sed ne la versajn, por ne ŝanĝi la originalajn rimon kaj ritmon. Pri la aŭtoreco de senaŭtoraj kunlaboroj la redaktoroj respondos laŭeble.


# ĈEFARTIKOLO

Kun la ŝanĝo de la estraro kaj redaktistaro de "HEJS-Juneco" nia asocio komencas novan etapon. Unuafoje en 25-jara evoluo de HEJS, ŝanĝo de estraro ne produktas krizon. Estas ja klare do, ke nia agado atingis solidan maturecon.

Tio povas doni al ni optimisman bildon pri la evoluo de la hispana esperantista junularo estonteca. Komencas flori pluraj diversaj lokaj kaj autonom-komunumaj grupoj kaj junuloj prezentiĝas kiel lingve kaj aktive altnivelaj. Bela bildo tamen ne sufiĉas. Per vortoj malmulton oni faras kaj esperantistoj grave kulpas pri demagogeco. Restas al ni efektivigi niajn ideojn per konstata laboro, kaj nur post kelkaj jaroj ni komencos ricevi ties fruktojn.

Neniam antaŭe ni troviĝis en pli bona situacio. La nova estraro estas entuziasma kaj kompetenta. Necesas nur, ke la membraro reagu al ĝiaj vokoj. La estonteco de HEJS estas, aliflanke, plena je problemoj -kurioze ne internaj- kies nesolvo kompromitas ĉian progreson. Espereble modero kaj racio evitos stultajn katastrofojn.

**MASP**



**LA VENONTA RENKONTIĜO DE HEJS OKAZOS KIEL SPECIALA PROGRAMO ENE DE LA JUBILEA KONGRESO DE HEF EN MADRIDO**

Efektive, ĝi estos tiel elstara kiel la ĝisnunaj renkontiĝoj de HEJS, sed, samkoste, vi povos partopreni la nacian kongreson. Rememoru, ke vi devas rekte aliĝi al kongreso (ne forgesu noti vian aĝon)

**VIDU ALIĜILON EN LA LASTA KOVRILA PAGO**

# LETEROJ AL LA DIREKTORO

## Pri "ĝis kiam"

Kara amiko:

Estas mirinda la sento de la kataluna popolo, sed ĉu vi ne opinias ĝin troa? Aliaj hispanaj komunumoj troviĝas sub pli granda diskriminacio.

Katalunoj prave plendas kontraŭ la hispana imperiismo, sed Katalunio riĉiĝas malfavore de aliaj komunumoj; ĉu ne estas imperiismo via enmiksiĝo en najbarajn kulturojn kiel la valencian kaj balearan, kies aŭtoktonecon vi intencas igi kataluna?

Kial oni ne komprenas katalunojn? Pro ilia ŝovinismo: kataluno konsideras sin pli bona kaj supera ol alia; tion kompreneble ne ŝatas personoj, kiel la esperantistoj, serĉantaj fratecon, amikecon kaj egalecon. Ĉu ne estas politiko uzi, kiel katalunoj uzas, Esperanton?

Mi finos per okazaĵo; kataluna societo skribis leteron al valencia esperantisto. Ĝi estis katalunlingva. Tiu persono ne komprenis kaj ricevis malfavoran opinion. Por kio estas Esperanto?

R. García
Valencia Komunumo


Estimata direktoro:

Al la aŭtoro de "ĝis kiam" kaj al la aŭtoro de la artikolo kontraŭ la aŭtoro de "ĝis kiam" mi povas diri nur jenon: manikeismo neniam pravas.

Mi profitas la okazon, aliteme, esprimi al vi mian konvinkon ke de tute neutrala vidpukto, vi estas la plej bela, inteligenta kaj kapabla esperantisto en Hispanio - kaj eĉ en la mondo!

Ricevu narcisan saluton

Miguel A. Sancho
Madrido
- Direktoro de "HEJS-Juneco"-



# ŜANĜO DE LA ESTRARO

## La paĝo de Superhejs

La legantoj de "HEJS-Juneco" baldaŭ ricevos cirkuleron kun detalaj informoj pri la ŝanĝo de la estraro, pro kio ni dediĉos nur malgrandan spacon al la temo. La pasintan junion la nova estraro kandidatiĝis proponata de la antaŭa. Tuj okazis poŝta voĉdonado de la Komitato ratifanta tiun elekton.

La nova estraro jam havas la tutan monon kaj meterialon kaj do ĝi jam komencis funkcii. Jen ni informas pri la aktuala listo de estraranoj kaj adresoj:

Prezidanto: Alberto Franco Ramírez (Sevilo)
Vicprezidanto: Miguel A. Sancho (Madrido)
Unua Sekretario: Francisco A. Antúnez (Sevilo)
Dua Sekretario: Antonio Rodríguez Gasch (Sevilo)

Komitatanoj C: Pablo J. Romero (aplikado de Scienco en Esperanto). Komitatanoj A: Jesús Armengol Arbiol, José María Rodríguez, Jorge Camacho Cordón.

Komisiitoj: Alberto Franco (financoj), M.A.Sancho (eldonoj), Antonio Rodríguez (paĝo de HEJS en Boletín), Jorge Camacho (komitatano de HEJS en TEJO, kulturaj rilatoj kun KEJ, informoj al TEJO-Tutmonde).

"HEJS-Juneco": Miguel A. Sancho

Oficejoj:
- Centra: Sol, 75 41003 Sevilla Tel. (954)415991
- Madrida: Atocha, 98 28012 Madrid Tel. (91)2308798

Pagoj: HEJS/ Cuenta Corriente nº30-01333-J, Agencia nº6 del Banco Exterior de España (Sevilla)

Bv. de nun sendi viajn pagojn kaj leterojn al la novaj adresoj.

# KIAL TIU OBSEDO?

Se oni estas tralenginta la kvar aŭ kvin lastajn numerojn de "HEJS-Juneco", estas facile konstati, ke la plej pritrakti taj temoj en la artikolaro estas esperantismo en Hispanio, krizo de la hispana movado kaj krizo de HEJS; resume... movadaj problemoj.

Leginte tion eksterlandano pensus eble, ke hispanaj esperantistoj okupiĝas nur pri tiaj frivolaj temoj... Sed Esperanto estas io pli ol movado.

Estas certe, ke dum la barbastra HEJS-Tendaro oni sciigis al mi, ke la hispana movado suferas krizon pro siaj neforteco kaj malviglîĝo. Sed... kial tiu obsedo? Kial en HEJS-Juneco oni verkas tiom multe pri la movado? Kial tiom pri internaj aferoj? Ĉu la krizo estas tiel grava? Kaj fine, ĉu la movado estas tiel grava? Mi eksplikas:

La movado troviĝas ene de la organizaĵoj. Jen la celo de la esperantistaj organizaĵoj, miaopinie:

- faciligi kontaktojn inter esperantistoj
- pliviglîgi la lingvon per libroj, revuo, ktp.
- kaj, verŝajne antaŭ ĉio, disvastigo.

Siavice, disvastigo taŭgas por ke la lingvo ne mortu kaj allogi homojn al la Internacia Lingvo. Sed ne iujn ajn!

Mi povas klarigi ĉi-lastan opinion, absolute personan: disvastigo estas allogi eblajn bonajn parolantojn. Ni ne bezonas malbonajn parolantojn! Ekzistas jam sufiĉe da ili! -mi diras eble kion multaj pensas, ĉu ne?-. Atentu, mi ne intencas diri, ke la disvastigo tra la tuta mondo -ke ĉiuj parolu Esperantonestas stultaĵo. Tute male! Unue tamen la celo estas plifirmigi la lingvo-kapablon de ĉiuj, kiuj ekparolas Esperanton.

Kial, fine, allogi eblajn bonajn parolantojn? Ĉar Esperanto estas unue lingvo, kaj nur poste ĝi fariĝas ideo.

La disvastigo estas nur vojo por atingi ĉi tiun idealon: grandega grupo de parolantoj, de bonaj parolantoj.

La mezurunuo por provi esperantistajn organizaĵojn estu la jena: ĉu ĝi kapablas allogi bonajn parolantojn? Se jes, ĝi antaŭen marŝas; se ne, la batalo estas antaŭperdita.

Per tia agmaniero ni ne forpelas nian respondecon kiel esperantistoj; male, ni tiel engaĝiĝas!

Nepra konkludo: mi estas engaĝiĝanta. Mi klopodos allogi bonajn esperantistojn. Kiu volas engaĝiĝi kun mi? Esperantismo estas ne nur belaj vortoj kaj intencoj... oni devas agi! Sed ne iamaniere.

Antonio Valén
Aragono (JESA)

**CESTO**

La pasintan 14an de februaro, kun la ĉeesto de la konsilanto pri kulturo de la valencia aŭtonoma komunumo, s-ro Giscar, estis inaŭgurita la loka kulturdomo.
Tie troviĝas la nova ejo de la ĉesta grupo. Notu do ĝian novan adreson:

Ateneo Cultural Esperantista "Lumradio"
Casa de la Cultura
C/ Antonio Machado, 6
46380 CHESTE

**ROTERDAMO**

Baldaŭ aperos la fama volumo "Pandemonio", teksto-kunaĵo de junaj verkistoj hispanaj, aŭspiciata de HEJS kaj pagata de Andaluzia Esperanto Unuiĝo.
La GC de UEA jam pretas ĝin presi. La kosto en Hispanio verŝajne estos ĉ. 600 pes. kaj eldon-kvalito estas antaŭvidata. Pripensu vian aĉeton!

**SEVILO**

La Komitato de HEJS, verŝajne unuanime, aprobos amendon al la Statuo per kiu ĉiuj aperoj de la radiko "aliĝ-" estas anstataŭtaj de "federaci-".
Tiu formala ŝanĝo celas igi okulfrapa, kio ja estas evidenta en la Statuto mem, t.e., ke HEJS estas tegmenta organizo kunordiganta sendependajn federaciiĝintajn asociojn.

# ĈU TAŬROLUDO AŬ TAŬROTORTURO?

Kelkajn aferojn en tiu ĉi mondo mi ne komprenas, kaj mi estas certa, ke mi ne komprenus eĉ se miljara. Mi ne povas kompreni ekzemple la ekziston de personoj, kiuj ĝuas kiam ili vidas viron aŭ virinon- torturantan beston. Sed kio plej neeksplikeblas el tio estas, ke ili nomas tion "arto". Mi unue konsilus al ili la uzadon de alia vorto por ne insulti la verajn artistojn kaj la ŝatantojn de la vera arto. Mi tute ne komprenas, due, kio estas tiom interesa kaj mirinda en ĝi. Suferigi neniam estas arto, eĉ se oni faras tion laŭ bele konstruita regularo.

Se ni akceptas tion, ni devos konkludi, ke ankaŭ torturo aŭ seksperforto estas artoj.

Kontraŭe, se la merito de tio konsistas el la diversaj manmovoj faritaj de la taŭroludisto per ludmantelo, mia opinio estas, ke tia agado ne neprigas la sangon. Mi demandas min ĉu arto konsistas el kruela torturado de bestoj antaŭ aro de sadismaj spektantoj avidaj je sango.

Kiajn meĥanismojn, aliflanke, havas la homoj por pravigi tian torturadon en la t.n. "civilizaj landoj"? Kelkaj religiuloj pensas, ke la homo havas animon kaj tamen ne la bestoj. Laŭ tio ni rajtas senkonsciencriproĉe vundi ilin. Kompreneble tiu teorio ne validas por ateoj.

Aliaj asertas, ke homoj estas superaj ĉar ili posedas memkonscion.Laŭ ili bestoj estas nur maŝinoj kaj ni povas agi laŭplaĉe rilate al ili. Neniu kapablas tamen demontri, ke bestoj ne havas konscion; kaj do ankaŭ ĉi tiu teorio estas fiasko.

Malplejmulto diras, ke ni estas pli evoluitaj je inteligenteco, pro kio ni vere rajtas manipuli la naturon. Se ni sekvus tiun ĉi aserton, ni devus esti certaj, ke, se eksterteranoj pli inteligentaj ol ni venus en la Teron, ili rajtus sammaniere suferigi nin per iu ajn pli-mapli kaŝita torturoludo. Laŭ tio ekzemple torturo en la naziaj koncentrejoj estis prava kaj akceptebla.

Kelkaj diras, ke taŭroj ne suferas. Tio estas granda mensogo. Mi legis broŝuron, kiu klarigas kion, laŭ la reguloj de tiu"arto" devas elteni la kompatindaj bestoj antaŭ kaj dum la ludado. Feliĉe por mi kaj por la leganto, mi ne memoras ĝin detale, sed

iu el la plej laŭdindaj manieroj meti la spadon en la korpon de la taŭro estas piki specifan lokon de la pulmo, por ke tiu lasta pleniĝu je sango kaj tiel malpermesi la spiradon de la besto.


Mi ne kritikas taŭroludistojn kaj klopodas kompreni iliajn motivojn -la plejmulto el ili devenas el malaltaj kulturaj kaj ekonomiaj medioj, kaj taŭroludado aperas antaŭ ili kiel maniero atingi monon kaj famon-, sed la apogantojn de tiu sovaĝa kaj kruela agado, kiuj eĉ pagas por ĝi.

Ekonomiaj interesoj nomas ĝin "Nacia Festo" kaj oni propagandas por ke ĝi ne malaperu, ĉar, laŭ kelkaj, ĝi estas grava hispana tradicio, kiu altiras turistojn.

La trista flanko de tio estas, ke eksterlandanoj venas en taŭroludejojn por testi kiel kruelaj kaj primitivaj ni estas, kaj bedaŭrinde la plejmulto el ili pensas, ke nia kulturo estas tio. Ni havas tre ampleksan kulturan posedaĵon kaj ni montras al la aliaj nur nekompreneblajn kaj ridindajn kruelaĵojn. Ĉu vere Hispanio estas malsama?

Jam estas tempo, ke kelkaj neelteneblaj aferoj ŝanĝiĝu en nia lando. Estas necese por ni ĉiuj, ke tiu nacia hontigaĵo malaperu kiel eble plej baldaŭ.

Natividad Millán Santamaría
Madrido



## POEZIA MUGILO



Miaj ruĝaj cicoj atendas vian langon.
Miaj mamoj bezonas viajn seksajn kisojn.
Mia postaĵo esperas viajn dolĉajn karesojn.
Mia vagino petegas vian rigidan kacon.

Fiku min; metu vian penison tre malrapide
por ke mi povu senti eniri vian ĉuron.
Perfortu min; rompu mian himenon,
ĉar mi deziras ĝui.


Se vi faras tion, mi lekos vian kacon
kaj karesos viajn ĉurovojn,
kaj ni ambaŭ sentos grandan plezuron.

[redacted].
Madrido

# pri la fiŝa translokiĝado

La fiŝoj translokiĝas per la movo de siaj naĝiloj kaj de sia korpo mem. La fiŝnaĝiloj povas esti paraj au neparaj. Estas paraj naĝiloj la brustaj kaj pelvaj -au ventraj- naĝiloj. Ili samvaloras respektive kiel la antaŭaj kaj postaj piedoj de la surgrundaj vertebruloj.
Estas neparaj naĝiloj la anusa -situanta post la anuso-, la vosta kaj la dorsa naĝiloj -povas esti pluraj dorsaj naĝiloj. Oni povas vidi la situon de la fiŝaj naĝiloj en la bildo 1.

bildo 1: ĉefaj eksteraj karakteroj de tipa fiŝo (flanke vidata).





1- buŝo, 2- nazaj truoj, 3- okulo, 4- radioj, 5- dorsaj naĝiloj, 6- flanka linio, 7- vosta naĝilo, 8- vosta pedunklo, 9-anusa naĝilo, 10- anuso, 11- pelva (aŭ ventra) naĝilo, 12- brusta naĝilo, 13- operklo,

La strukturoj, kiuj subtenas la fiŝnaĝilojn nomiĝas radioj. En la fiŝtranslokiĝado partoprenas du tipoj de movo: la ondumanta kaj la balanciĝanta.
Generale en la ondumanta movo agas la impulsilo, t.e. la strukturo, kiu havigas la impulsan forton. Estas du tipoj de fiŝaj strukturoj por ondumi:


1. la korpo kaj la vosta naĝilo, kiuj agas kiel unuo. Per kuna ondumado de tiuj strukturoj impulsiĝas ekzemple la angilo -bildo 2-, la truto -bildo 3-, la skombro, la ŝarko, la ezoko, la salmo kaj la amerika perko.

2. la naĝiloj fiksitaj je la korpo per longa bazo. Tiuj longbazaj naĝiloj povas kreski jen sur la meza linio de la dorsa kaj ventra surfacoj, jen, pare, sur la flankoj. La tranĉilfiŝo moviĝas per la longbaza ondumanta naĝilo de sia ventra surfaco -bildo 4-.



bildo 2: angilo (dorse vidata).

bildo 4: tranĉilfiŝo (flanke vidata).



anusa naĝilo (ĉi tiu estas la naĝilo, kiu ondumas)


En la balanciĝinta movo la korpa parto, kiu havigas la impulsan forton, deiras antaŭen kaj malantaŭen dum ĝi samtempe turniĝas ĉirkaŭ sia bazo.

La balanciĝantaj naĝiloj uzas du fizikajn principojn por produkti la impulsan forton. Tial distingiĝas du tipoj de balanciĝo-movoj: la remil-movo kaj la flugil-movo. Mi klarigos tiujn tipojn de movo en venonta numero de tiu ĉi revuo.

La surfrifperko kaj la mandarenfiŝo estas ekzemploj pri fiŝoj, kiuj uzas la balanciĝantajn naĝilojn kiel ĉefan impulsan forton.

Oni ofte uzas la ondumantajn kaj balanciĝantajn naĝilojn nehelpatajn de korpaj movoj kiam la fiŝo malrapidege translokiĝas kaj troviĝas en situacioj, kiuj postulas prezicecon je la manovroj, kio grave kontribuas al ĝia nutrado kaj konsekvenca postvivado. La rapida naĝado bezonas pli da energio; pro tio, por la akcelado kaj bremsado estas uzata la granda muskola maso situanta je ambaŭ flankoj de la fiŝkorpo; per tiuj muskoloj oni produktas la ondumadon de la korpo kaj de la vosta naĝilo.-vidu bildon 5.

Bildo 5: tipoj de impulsiloj de la fiŝoj.




En la perioda impulsado la naĝaj movoj ripetiĝas cikle. Kontraŭe, en la intertempa impulsado, la naĝaj movoj estas neniel ciklaj. La perioda impulsado produktas kontinuan naĝadon, kaj la intertempa, momentetan akceladon.

La manovrado konsistas en la malrapida kaj preciza translokiĝado kun oftaj direktoŝanĝoj.

DAŬRIGOTA

Pablo J. Romero Gómez
Andaluzio

# PANSPERMIO

Lastatempe oni intense parolas pri la haleja kometo kaj la ekspedicioj tien organizataj. Multaj homoj tial eble sin demandas pri la taŭgeco de tiu laboro aŭ pri tio, kion ĝuste oni povos profiti el la studoj de la citita kometo. Pro tio mi volas nelonge prikomenti la teorion de la brita fizikisto kaj astronomo F. Hoyle, kiu defendas kontraŭ la nunaj ortodoksaj principoj, ke la vivo venis al nia planedo elekstere.

Tiu teorio nomiĝas "Pansperemio" kaj konsistas en tio, ke kometoj "spermumas" tiujn planedojn, preter kiuj ili pasas per unuĉelaj estaĵoj -eble malaerobiaj bakterioj. Poste, se tiuj bakterioj trovas taŭgan medion en tiuj planedoj, ili evoluas en plej komplikajn estaĵojn -unue aerobiajn, poste plurĉelajn, kaj tiel plu. Laŭ la ĵus dirita ni povas do konsideri la kometojn portiloj de la vivo tra la universo.

Tiun teorion krome helpas la lastaj reserĉoj de "International Halley Watch" asertantaj, ke en la nigra kerno de la haleja kometo troviĝas organika materio. La oficiala scienco tamen rimarkas, ke ne estas pruveble, kiel tiuj mikroorganismoj povas supervivi dum la trauniversa veturo.

La tradicia teorio hipotezas, ke la vivo komenciĝis en la oceanoj, kie koncentriĝoj de kemiaj kunmetaĵoj interreakciis pro nura hazardo, kaj el tio formiĝis organikaj substancoj. Hoyle konstatigas kontraŭ tio, ke la probableco de apero de tiuj substancoj pro hazardo estas ege malgranda -kvazaŭ voli atingi 50.000-foje la saman numeron per sinsekvaj kubĵetoj.

Estu tiel au aliel, ni ne povas negi, ke la pluaj reserĉoj pri la haleja kometo disponigos al ni interesegajn elĉoj pri la haleja kometo disponigos al ni interesegajn eltrovojn, kiuj eble ovros la misteran pordon de la origino kaj formiĝo de la universo kaj ties vivo.

Alberto Franco Ramírez
Andaluzio

# 47a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrido de la 16a ĝis 20a de Aprilo 1987

1887 – JUBILEA JARO – 1987

---

# ALIĜILO N-RO.......

(BONVOLU SKRIBI TAJPE AŬ PRESLITERE)

Familiaj nomoj .........................................

Antaŭnomo, s-ro/ s-rino/ f-ino (1) ..........................

Aĝo (2) .............. Profesio (2)...........................

Adreso ................................................

Urbo .............. Poŝtkodo ....... Provinco (3) ............

Mi aliĝas al la 47a Hispana Kongreso de Esperanto kaj sendas per poŝtmandato, ĉeko, aŭ banko (1) la jenan sumon:

Kiel kongreskotizon en kategorio ........................................ p-tojn

Kiel kongresdonacon ........................................ p-tojn

ENTUTE: ........................................ p-tojn

Plenigu apartan aliĝilon por ĉiu familiano samtempe aliĝanta

(1) Forstreku la nevalidan.

(2) Nur por statistiko.

(3) Eksterlandanoj menciu la landon.

Por uzo de la administracio:

| | | |
|---|---|---|
| Pago ricevita | Konfirmilo sendita | Loĝejo mendita |

# KONGRESKOTIZOJ

| | | 31/6/86 | 31/12/86 | 30/3/87 | |
|---|---|---|---|---|---|
| 1. | Kongresano ............... | 2.000 | 2.500 | 3.000 | p-toj |
| 2. | Kongresano (Membro de HEF) | 1.500 | 2.000 | 2.500 | " |
| 3. | Edzino de Kongresano ....... | 1.300 | 1.600 | 1.900 | " |
| 4. | Edzino de Kong.(kateg. 2) .... | 1.200 | 1.500 | 1.700 | " |
| 5. | Juna membro de HEJS (ĝis 26 jaroj) ............... | 800 | 1.100 | 1.300 | " |
| 6. | Junul-o (ino) ne membro de HEJS .................. | 1.000 | 1.300 | 1.500 | " |
| 7. | Eksterlandano ............. | | (SENPAGE) | | |
| 8. | Infano ĝis 14 jaroj .......... | 900 | 1.100 | 1.400 | " |
| 9. | Emeritaj gekongresanoj ...... | 1.000 | 1.300 | 1.500 | " |

Membro de HEF-HEJS n-ro ........

Loĝejoj: Ni informos per HEF-BULTENO

**Rimarkigoj:**

1. Plenigu la aliĝilon kaj sendu ĝin al la kongresa sekretariejo: Liceo de Esperanto, Atocha, 98, 4°, 28012 MADRIDO
2. Sendu la koncernan kotizon al la 47a Hispana Kongreso de Esperanto, konto n-ro 16146-06, Banco Credit Lyonnais, Castellana, n-ro 39, 28001 Madrido.
3. La kotizo ne estos repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenas en la kongreso.
4. La aliĝilon oni pritraktos nur post ricevo de la koncerna pago.
5. Kongresanoj en kategorioj (2) kaj (5) devas sendi ateston de HEF pri la pago de la kotizo de 1987.
6. Se vi bezonas pliajn aliĝilojn, petu rekte de la kongresa sekretariejo: Liceo de Esperanto, Atocha, 98, 4°, 28012 – Madrido.